Brazilo en 1983 havis 216 individuajn membrojn kaj 959 aligitajn membrojn (B.E.L.: 309, K.K.E.: 650). Entute, 1175. Tial, Brazilo rajtis sendi al Vankuvero du komitatanojn: S-ron Evaldo Pauli (SC), kiu anstataŭis min, nome de B.E.L., kaj S-ron Adonis Saliba (MG), kiu anstataŭis S-ron Cunha nome de K.K.E. Nia partopreno en Aŭgsburgo dependas de la ciferoj rilataj al 1984, kaj B.E.L. havis tiam iometan pligrandiĝon en sia anaro (Vidu *BEL Informas* n-ro 20, Februaro 1985). Tamen ekde nun B.E.L. estas la nura landa asocio de U.E.A. en Brazilo, kaj tial la nombro da brazilaj komitatanoj dependas ekskluzive de la membraro de B.E.L. Se ne estos plurcenta pligrandiĝo en tiu membraro, Brazilo rajtos sendi nur unu komitatanon al Pekino kaj al Varsovio.

Por ke oni bone komprenu la nunan situacion kaj nian potencialon, mi prezentas ĉi-sube resumon de la analizo, kiun mi faris, pri

la konsisto de la membraro de U.E.A. en 1984 (revuo *Esperanto*, Februaro 1985) kaj de B.E.L. en 1983 (bazo por la kalkulo de U.E.A./84). La totaloj de B.E.L./84 estis

komunikitaj al U.E.A. en Marto/85 kaj estos konsideritaj por la partopreno en Aŭgsburgo, kaj estos publikigitaj en la revuo *Esperanto* en Februaro 1986. Kaj tiel plu, ĉiujare.

1. Proporcio IM: AM en UEA/84

		IM	AM	Tot	IM:AM
Okcidenta Eŭropo	(14)	3155	6354	9509	1:2
Riĉaj landoj ekster E.	(7)	1169	2101	3270	1:2
Suda Eŭropo	(7)	464	2638	3102	1:5
Brazilo (BEL + KKE)	(1)	216	959	1175	1:4.5
Ĉinujo	(1)	58	1112	1170	1:20
Orienta Eŭropo	(8)	752	18723	19475	1:25
Cetero de la mondo	(56)	442	862	1304	1:2
Totalo (94 landoj)	(94)	6256	32749	39005	1:5

2. Proporcio IM: AM en Brazilo/83

	IM	AM	Tot	IM:AM
RJ	66	202	268	1:3
SP	60	20	80	1:0.3
MG/ES	25	25	58	1:1.3
PR	7	21	28	1:3
RS/SC	11	15	26	1:1.3
DF, GO, MT, MS	14	5	19	1:0.3
Nordoriento	28	11	39	1:0.4
AC, AM, PA	5	2	7	1:0.4
IM	216	—	—	—
AM/BEL	—	309	525	1:1.5
AM/KKE	—	650	—	—
Totalo	216	959	1175	1:4.5

Noto — La ŝtataj totaloj AM por Brazilo/83 rilatas nur al B.E.L. Rilate al la 650 AM de K.K.E. ni estas informitaj, ke 60% el ili estas el RJ. La diferenco inter la totaloj IM/UEA kaj IM/BEL venas de la ekzisto de multaj DM/UEA kaj de la rekta sendo de kotizoj fare de kelkaj landoj de U.E.A. en Brazilo.

Trastudante la ciferojn de U.E.A., oni rimarkas, ke estas du kialoj por ke la nombro da I.M. estu granda rilate al tiu da A.M. (proporcio 1:2): (a) la lando estas tre riĉa kaj pagipova, kiel Usono, Francujo kaj Nederlando, kaj ĉiu ano de la landa asocio facile povas fariĝi ankaŭ individua membro de U.E.A.; aŭ (b) la movado estas tiel malforta, kiel tiu de la 56 landoj, kiujn mi nomis "cetero de la mondo", kaj pro tio mankas landa asocio kaj, konsekvence, ne povas esti aligitaj membroj.

Brazilo estas neriĉa lando, kaj ĝia enorma ŝuldo al eksterlandaj kaj internaciaj bankoj faras ĝin preskaŭ nepagipova. Tial, ĝia proporcio IM:AM devus estis inter tiu de Suda Eŭropo (relative malriĉaj landoj) kaj tiu de Orienta Eŭropo (nepagipovaj landoj). Trastudante la UEA-ciferojn de Brazilo, oni rimarkas, ke ĝi havas pli da individuaj membroj ol Pollando, Svislando, Hispanujo, Jugoslavio aŭ Ĉinujo, kies movadoj ja estas tre fortaj.

Do la brazila "malsano" ne rilatas al la kvanto da aligitaj membroj.

Se nia movado estas malriĉa, sed forta (kaj tia estas la vero), ĝi devus havi multe pli da aligitaj membroj en U.E.A. ol ĝi havas nun (Pollando havas 6700 kaj Bulgarujo havas 5110). Se en Brazilo tiaj membroj mankas, ia "malsano" ekzistas. Palpante malsanulon oni trovas liajn malsanajn punktojn. En nia kazo, sufiĉas kompari ciferojn laŭ Ŝtato. Ni rimarkas, ke nur Rio kaj Paraná havas la akcepteblan proporcion 1:3 en 1983 (vidu nian tabelon).

En la 66-a U.K. ni jam estis rimarkintaj, ke la du Ŝtatoj, kiuj sendis plej multe da kongresanoj al Brasília estis unue Rio kaj due São Paulo. Pli-malpli duono el la kongresanoj brazilaj en Brasília venis el tiuj du Ŝtatoj. La situacio rilate al AM estas tamen multe pli malekvilibra, kaj verŝajne estas tia

almenaŭ ekde kiam mi eniris la movadon antaŭ 40 jaroj. Ĉirkaŭ duono el la anoj de B.E.L. estas el Rio, kaj ĉirkaŭ 60% el la anoj de K.K.E. estas el Rio. *Oni konstatas bedaŭrindan fakton, ke jam de multaj jaroj pli ol duono el la AM de U.E.A. en Brazilo estas el Rio*, malgraŭ la fakto, ke jam delonge la ĉefdelegito de U.E.A. en Brazilo ne plu estas el Rio. "Bedaŭrinda fakto" mi diras ne pro tio, ke la movado en Rio estas "forta" (66 IM kaj pli ol 500 AM en 1983, konsiderante B.E.L. kaj K.K.E. kune), se pro tio, ke, almenaŭ en niaj statistikoj, la movado estas malfortega en la tuta cetero de nia lando.

Se oni konsideras la raportojn, kiuj alvenas el kelkaj Ŝtatoj, pri kursoj kun pli ol cent lernantoj, oni konscias, ke feliĉe tiu malforto estas nur ŝajna. En tre multaj aliaj Ŝtatoj la loka movado estas vere tre forta. Sed ilia kontribuo al la nacia kaj al la internacia movadoj ne estas proporcia al iliaj fortoj.

Oni devas laŭte rimarkigi, ke en nia lando estas unu laŭdinda kaj imitinda escepto: Paraná. En 1983 (vidu tabelon) ĝi havis 7 + 21 membrojn, kaj en 1984 ĝi preskaŭ duobligis tiun kvanton (7 + 50). *La 50 AM el Pa-*

raná pruas, ke la proporcio 1:7 estas adekvata por nia lando. Nome de B.E.L. kaj de U.E.A., mi diskrias: Dankon, Paraná!

Nun, sen K.K.E. en la verbado por U.E.A., fariĝas nepre necesa la helpo de ĉiuj brazilaj Ŝtatoj, laŭ la modelo de Paraná. *Kaj tiun helpon oni povas konsideri parto de nia kunagado por la jubileo de Esperanto.* Ĉu ni kune varbos por U.E.A.? Se, anstataŭ plu paroli pri novaj disdividoj kaj kreo de novaj organizaĵoj, niaj izolemaj lokaj kluboj kaj asocioj decidis serioze kunlabori, Brazilo certe povos denove atingi 350 aŭ 400 individuajn membrojn de U.E.A. La ekziston de tiu potencialo pruvis la sukceso de la 66-a U.K. en Brasília, kun preskaŭ 1000 brazilaj partoprenantoj. Per la belega proporcio de Paraná, 1:7, Brazilo havos 3200 membrojn en U.E.A. (400 + 2800) kaj rajtos partopreni en la Jubilea U.K. kun kvar komitatanoj. Ne gravas, ĉu tiuj komitatanoj estos mi mem (kiu ja intencas iri tien), Cunha, Pauli kaj Saliba, aŭ Knoedt, Mattos, Francini kaj Elvira. Brazilo havas multe da taŭgaj reprezentantoj. Kaj Zamenhof meritas nian amasan partoprenon en Varsovio.

DIPLOMOJ

1984

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon jenaj esperantistoj:

NORMA BAZA DIPLOMO

En la sidejo de B.E.L.

Abel Sidney de Souza
Adelaide Gonçalves Lopes
Adnilton Correia de A. Nogueira
Alberto Fulgoni dos Santos Lara
Alfredo Fernando L. de Araújo
Almir Fernandes
Aloísio Pereira Braga
Alzira Célia da Silva Cunha
Amâncio Cardoso
Ana Maria Carneiro Fonseca
Anério Ferreira Matos
Arnaldo Fulgoni dos S. Lara
Aroldo Praguassu Filho
Célia Maria Tavares Römer
Célio Lopes da Silva
César Andrade Alves
Deuza Maria Dantas Nogueira
Ely Banks dos Santos Pinheiro
Ely Figueira
Eneida Nasare Gomes Silva
Esio Sardinha de Souza
Eva Alves Faria

Flávio Martins Carneiro
Gilvandro Pereira da Silva
Helena Vicente Leitão
Hércules Egídio Dias Agharian
Iara Telles Lima
Jacira Castanho
Jacy G. de Miranda Sá
Jaqueline da Silva Tergolina
Joana D'Arc do Valle Bahia
João Baptista de Arruda
Jorge Luiz Alves Martins
José Carlos Martins Barbosa
Júlio Cesar Souza Mota
Juracy Jacob de Mattos
Katia Oliveira Lovaglio
Leila Maria da Silva
Lucy Prudente dos Santos Belleza
Luis Carlos de Moraes Junior
Luiz Vargas Pareto
Mamede Fatá Vieira
Manoel da Costa Ribeiro
Marcelo Biangolino Xavier
Márcia Heloísa Campos Filgueira
Margarida Clemente Martins
Margarida Eugênio M. dos Reis
Maria da Conceição A. do Valle
Maria da Conceição B. Nascimento
Maria de Fátima Carneiro Fonseca
Mário Lúcio de Andrade Neves
Mary Lannes Salles Silva

Maurício Biangolino Xavier
Miriam Yaeko Taho
Nely Ferreira Soares
Neuly Freire Ferraz
Paulo de Faria Cavalcanti
Paulo Jorge de Almeida
Raul Abbott Barbosa
Roberto Costa Assumpção
Tereza Maria Ribeiro Gomes
Terezinha de Jesus Aguiar Barreto
Thereza Sita de Cars
Ulisses Fernandes da Silva
Wagner Luís Teodoro de Farias
Wellington Garcia
Wilson D'Almeida Santana
Wilson de N. de Oliveira Coelho
Zozimo Pereira Costa

Per korespondado

Carlos Alberto Alves Pereira,
Rondonópolis, MT
Celso Augusto Goulardins Gaspari,
São João da Boa Vista, SP
Chantal Vogel, Itabuna, BA
Domingos José dos Santos, São Paulo, SP
Eros Braga Biscotto, Ubá, MG
Haydée Fonseca Barreto, Rio de Janeiro, RJ
Hilomar Martins Oliveira,

Ipatinga, MG
 Izilda Ciribelli Campos, São Paulo, SP
 Joaquim de Paula Codeço, Campos, RJ
 Jorge Bastos Furnam, Rio de Janeiro, RJ
 Laura Baronheid, Rio de Janeiro, RJ
 Maria das Dores Góes de Oliveira, Brasília, DF
 Moacyr Humberto Leonel, Rio de Janeiro, RJ
 Nelson Gomes da Silveira, Belém, PA
 Osmar Casagrande Campos, São Paulo, SP
 Paulo Roberto M. dos Santos, Porto Alegre, RS
 Regina Celia F. Millani Gaspari, São João da Boa Vista, SP
 Ruy Cavalcanti de Albuquerque, Rio de Janeiro, RJ
 Sérgio dos Santos Cunha, Campo Alegre, PA

NORMA PROGRESIGA DIPLOMO

En la sidejo de B.E.L.

Alessandro Bifarelli Junior
 Alfred Karl Gregorius
 Alfredo Fernando L. Araújo
 Anécio Ferreira Matos
 Arandi Teixeira Pappalardo
 Arnaldo Fulgoni dos S. Lara
 Aroldo Paraguassu Filho
 Celso Andreoni

César Andrade Alves
 Chersoneso Galvão
 Cid de Carvalho Miranda
 Clélia da Rocha Campos da Silva
 Felismar Manoel
 Gilberto dos Santos Vasconcelos
 Gilvandro Pereira da Silva
 Helena Santos Dias
 Helena Vicente Leitão
 Hélio Mariano Canena
 Iara Telles Lima
 Izaura Rosa Simões
 Jacira Castanho
 Jaqueline da Silva Tergolina
 Jorge Luiz Alves Martins
 José Carlos Martins Barbosa
 Júlio Cesar Souza Mota
 Jurema Jacson dos Santos
 Léa Couto Hassan
 Lourival Etevaldo de Lima
 Lucy Prudente dos Santos Belleza
 Luis Carlos de Moraes Junior
 Marcelo Biangolino Xavier
 Maria da Conceição B. Nascimento
 Mário Ritter Nunes
 Maurício Biangolino Xavier
 Odete Rocha Teodoro
 Ricardo Fernandes da C. França
 Romualdo de Castro Celani
 Thereza Sita de Cars
 Wagner Luís Teodoro de Farias
 Wilson do N. de Oliveira Coelho
 Wellington Garcia
 Zozimo Pereira Costa

Ce Paraná Esperanto-Asocio, Curitiba, PR

Álvaro Maurício Delgado Diaz
 Carla Amato

Doriane Rossi
 Nanci Grott de Carvalho
 Ronie Cardoso Filho

Per korespondado

Antonio Felix da Silva, Montes Claros, MG
 Celeodiva de Moura Telles, Goiânia, GO
 Elisa Maria de Oliveira, Rio de Janeiro, RJ
 Eros Braga Biscotto, Ubá, MG
 Evaristo Manoel Pereira, São Paulo, SP
 João Batista da Silva, Olinda, PE
 Joaquim de Carvalho, Piracicaba, SP
 Jorge Grivot Fróes, Pelotas, RS
 José Carlos Parreiras e Silva, Araxá, MG

NORMA SUPERA DIPLOMO

En la sidejo de B.E.L.

Aroldo Paraguassu Filho
 Marco Aurélio da Rocha Rabello
 Odete Rocha Teodoro
 Ricardo Fernandes da C. França
 Ruy Cavalcanti de Albuquerque

Per korespondado

Espedita de Castro Feitosa, Curitiba, PR
 Gentil de Lima, São Paulo, SP



Petro II-a kaj Graham Bell

Posttagmeze de varma dimanĉo, Bell staris apud sia inventaĵo. Jam pasis 6 semajnoj depost la inaŭguro de la Ekspozicio de la Jarcento, okazinta en Filadelfio, 1876, kaj la juna inventisto ne sukcesis vekti la atenton de la Juĝkomisiono pri sia inventaĵo.

Ĉirkaŭ la 7-a vespere, la membroj de la Juĝkomisiono jam estis lacaj pro la varmego tago kaj pro la multnombraj inventaĵoj, kiujn ili devis ekzameni. Unu el la membroj alproksimiĝis al la inventaĵo de Bell, prenis la aŭdilon, indiferece rigardis ĝin kaj remetis

ĝin en la lokon.

Subite eniris en la salonon Petro de Alcântara, Imperiestro de Brazilo, kun la imperistredzino Maria Teresa kaj sekvantaro. La Imperiestro vidis Bell-n kaj kun la brakoj etenditaj ekkriis:

— Mia kara S-ro Bell, mi havas grandan plezuron revidi vin.

La juĝistoj tuj forgesis la varmon kaj la cecon. Kiu estas tiu juna inventisto, amiko de imperiestroj? Ili ne sciis, ke foje en vizito al Universitato de Boston, Pedro II-a forte interesiĝis pri la metodo uzita de Graham

Bell en la instruado al surdamutuloj. Juĝistoj kaj sciencistoj ĉirkaŭis la imperiestron Petro II-a kaj ekinteresiĝis pri la unua telefonaparato.

Alexander Graham Bell iris al la ekstremo de la salono dum la Imperiestro prenis la aŭdilon kaj almetis ĝin al la orelo. Pasis momento de streĉita atento. La Imperiestro per drameca gesto levis la kapon kaj entuziasme ekkriis:

— Mia Dio, ĝi parolas!

Ĝis la 10-a vespere laŭvice la membroj de la komisiono parolis kaj aŭdis per la unua telefonaparato.

En la sekvanta tago, la aparato estis translokita al la pavilono de la Juĝkomisiono, kie ĝi estis objekto de ĉies atento.

Tiel dank' al okaza vizito de la Imperiestro Petro II-a al la Ekspozicio de la Jarcento, la malgranda kruda aparato, ĝis tiu momento preteratentita, fariĝis la plej granda sukceso en la Ekspozicio.

(*El Sino Azul*, 1928)

Ridu, ni petas

Familio venis el internlando, luis domejon kaj decidis bredi porkojn en la korto. Tuj aperis urba oficisto por kontroli la tipon de nutraĵo ricevita de la bestoj.

— Manĝorestaĵoj, rekremento, forĵetaĵoj de restoracio kaj similaj... Klarigis la mastro.

Kaj li estis monpunita, ĉar la inspektoro opiniis, ke tio estis higienmanko. Post du monatoj, aperis alia inspektisto, kiu faris la saman demandon. Ĉi-foje la respondo estis alia:

— Terpomoj gratenitaj, meleagro farĉita per maronaĵo, milfolia kuko kaj migdala glaciaĵo.

Nova monpuno venis, ĉar la oficisto trovis absurda tian luksan manĝaĵon.

Pliaj tri semajnoj pasis kaj aperis tria inspektisto kun la sama demando. Je tiu ĉi fojo la vilaĝano jam estis preta:

— Mi tute ne scias, kion ili manĝas. Mi donas po Cr\$ 10.000 kaj ili mem havigas al si la manĝaĵon.

Pagu vian kontizon por 1985

OH QUE SAUDADES QUE TENHO!...

No movimento esperantista brasileiro são raros os livros de memória que grande utilidade teriam no registro de fatos da história num determinado período.

Neste número, começamos a publicar lembranças que “ao correr da pena”, Dr. Mário Ritter Nunes foi registrando. Nestes apontamentos, encontramos fatos e curiosidades envolvendo pessoas ilustres e que nos dão sua medida humana, às vezes cheias de humildade e idealismo.

Os originais chegaram às nossas mãos com o título acima e o texto está dedicado à memória dos saudosos idealistas Mário Augusto Teixeira de Freitas e Alberto Couto Fernandes. Neste trabalho, Dr. Mário Ritter Nunes lembra suas atividades esperantistas nas décadas 1940-1950.

Primeira fase de minha vida esperantista

Um convite-determinação — 1939

Em 1938, deixou meu escritório de advogado iniciante para integrar-me no grupo dos 15 primeiros servidores do Conselho Nacional de Estatística do I.B.G.E., a convite do seu então Secretário Geral, o incansável idealista Mário Augusto Teixeira de Freitas.

Em fins de 1939, fui chamado a seu Gabinete de trabalho. A seu lado, de pé, achava-se um senhor idoso que maltratava o botão do paletó, torcendo-o incessantemente, em atitude de penosa expectativa.

— Chamei-o, disse-me o Dr. Teixeira, entre delicado e incisivo, para fazer-lhe um convite-apelo: o esperanto foi considerado pela Assembléia Geral do Conselho Nacional de Estatística, segundo minha proposta, língua auxiliar da estatística brasileira. Preciso aqui de um esperantista. Quer ser você tal esperantista?

Como dizer “não” a um Chefe tão bondoso e idealista?... A meu “sim”, acrescentou ele:

— Este é o Dr. Alberto Couto Fernandes, Presidente da Liga Brasileira de Esperanto. Vai aprender o esperanto com ele, para vir depois desempenhar o encargo que lhe cabe aqui no I.B.G.E..

Aproveitando o mais possível — 1940

Prestigiado pelo incansável e idealista Dr. Teixeira de Freitas e em contato permanente com os tão maravilhosos “gerais” do esperando no Brasil naquelas décadas de 40 e 50, fiz-me elo de ligação entre o I.B.G.E. e a L.B.E. Explorei ao máximo a generosa compreensão do Dr. Teixeira e utilizei-me do bem montado Serviço Gráfico do I.B.G.E. além de material de Secretaria para a Liga, para publicação de todos os “Urboj” de Capitais brasileiras, dos “Statistika Resumeto” (2 n^{os}), “Statistika Resumo pri Brazilo — 1946”, “Tipoj kaj Aspektoj de Bazi-

lo" e tantas e muitas outras publicações, como o "Esperanto no Brasil", "Que é o Esperanto", "Gramática Sinóptica do Esperanto", "A Realidade do Esperanto", "La nova Erao de Esperanto kaj Tutmondeco", "Esperanto e Catolicismo" e tantas e muitas outras.

Original solenidade de "Bodas de Ouro" – 194?

Não me lembro do ano em que o fato ocorreu.

Quando o Dr. Alberto Couto Fernandes completou as "Bodas de Ouro" de seu casamento, sem filhos, convidou-me também e só os amigos Carlos Domingues, João Batista Melo e Souza e Ismael Gomes Braga para a Missa na Matriz de Nossa Senhora da Glória, no Largo do Machado, às 11,00 horas. Nós quatro chegamos minutos antes. E como o tempo àquela hora estivesse totalmente vazio, sem qualquer outra pessoa, entretemo-nos em conversa a meia-voz, junto ao altar-mor, à espera do início da solenidade. Pouco depois, despertaramos acordes vibrantes do órgão acompanhado de violino, a tocarem a "Marcha nupcial" de Mendelssohn. Voltamo-nos para ao corpo do templo e vimos aquele casal de velhinhos a caminhar pelo centro da grande igreja em passo lento e, de braços, em pose solene.

Éramos os quatro os únicos convidados do casal para aquela tão expressiva solenidade.

☆☆☆

RECENZO

La Senmorta kaj la Senviva, D-ro Nassif Issac. Kopirajto de la aŭtoro. Presita ĉe Grafika Studio Nevan, Rotterdam, Nederlando, 1975. 44 p.

En 1931, la aŭtoro, D-ro Nassif Isaac, spertis grandan ŝokon. Dum jaroj li diligente studis revante pri la tago en kiu li estos inter la servantoj de Dio, tial la rifuzo al lia peto eniri en seminarion kaŭzis surprizon. La surprizo estis pli granda, kiam li sciis, ke la lasta de la klaso, ĉu stude ĉu karaktere, estis akceptita, dum li la unua estis prokrastita unu jaron. Li sentis, ke lia vojo al la servado de Dio estis barita.

En 1937, li estis promenanta sur la ĉefa strato de Fajum, kiam li renkontis amikon irontan al la Biblia Societo por aŭdi prelegon pri komunikado kun la Spirita Mondo. Ĉar la temo estis neordinara kaj samtempe malkomprenata de la plimulto, li decidis ĉeesti.

Se la rifuzo pri akcepto al seminario skuis la kredon je Dio kaj kondukis lin al absoluta agnostikismo, la prelego pri komunikado

kun la Spirita Mondo same maltrankviligis lin.

Sur la paĝoj de "La senmorta kaj la senviva", D-ro Nassif Isaac rakontas sian longan kaj zorgan laboron en la esplorado pri la komunikado kun la Spiritoj, pri la kontinua ekzistado de la homa animo, fine pri la principoj de Spiritismo.

La aŭtoro dediĉas la verkon al la homoj sin okupantaj pri Spiritismo kun la deziro, ke ili profitu el la fruktoj de lia laboro.

L.A.M.



21-a Brazilia Kongreso de Esperanto

Loko kaj dato: Belo Horizonte, 17.07 – 21.07.85.

Iniciato: N.E.K. (Nacia Esperanto-Komisiono).

Planado kaj organizado: Associação Esperantista de Belo Horizonte (Rua Carijós, 141 s/807-808, 30000 Belo Horizonte, MG).

Org. Kom.: Prezidanto, Carlos Augusto Guedes; Viceprezidanto, Marcus T. de Almeida Flores; Unua Kasisto, Dalmo Soares Arantes; Dua Kasisto, Onésimo da Costa e Faria; Unua Sek., Ana Lúcia dos Santos Crespo; Dua Sek., Alberto Luís Minardi Chueiri.

Kongresa Temo: Survoje al la Centjara Jubileo: Esperanto sur la stratoj.

La kongresa temo celas starigi konkretajn proponojn por ke Esperanto fariĝu konata kaj agnoskata.

Laborloko: Instituto de Educação de Minas Gerais, Rua Pernambuco, s/n.

Turismo – Oni organizas ekskurson al la ĉefaj lokoj en Belo Horizonte kaj al la ĉefaj historiaj urboj proksimaj al Belo Horizonte.

KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

En 19.III.85 estis elektita jena nova Estraro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj: Prezidanto: D-ro Dilermando de Castro; Viceprez.: S-ino Cedilha Netto; Unua Sek.: D-ino Laura R. Carvalho; Dua Sek.: S-ino Aélia Scharpel; Kasisto: S-ro Jurguy Scherpel; Konsilantaro – Sylla Chaves kaj Alberto Curopos; Kontrolistoj: João Marques, Wanda Lopes, Ivan Leitão Ramalho.

Brazilia Esperanto-Ligo deziras al nova Estraro la plej bonan sukceson.

Erika Linz

LA DAZIPO DE BRAZIL

Kiam ni estis ĉi tie la unuan jaron ni iam iris sur vojeto laŭlonge de deklivo. Subite Harro faletis (tiam li estis 12-jara). Lia piedo trafis en grandan tute freŝan truon, kiun plenigis malfirma tero. Nia laboristo, negro Jozefo, kiu iris kun ni, sin klinis kaj atente esploris la freŝe elfositan teron. Li montris al signo de malgranda bestopiedo kaj flustris: "Hodiaŭ!" Kaj lia larĝa vizaĝo radiis je ĝojo.

"Kio estas?" Harro demandis ankaŭ flustre, sed li estis tiom ekscitita ke lia voĉo tamen iom laŭtis. Jozefo faris ĉagrenitan geston, ke ni nun ne parolu, nek pluiru. Sen sono, nur per la lipoj, li formis la vorton: *Tātu*. Tio estas la portugala aŭ pli ĝuste la indiana vorto por dazipo. (*)

Li levis bastonegon de sur la tero farante eĉ ne brueton kaj antaŭeniris paŝon post paŝo kiel kato, kvankam li estis granda kaj larĝa kiel bovo. Post kelkaj paŝoj li sin turnis al ni kaj montris tute senbrue al la alta herbo apud la vojo, kaj poste restis senmova. Harro ne moviĝis sed lia tuta korpo estis atentega. Vere, la herbo tie ŝanceliĝis laŭ stranga maniero. Tion ne povis kaŭzi la vento. Jozefo observis tiujn movojn tre streĉe. Li malfermegis la okulojn tiom ke iliaj blankoj aspektis kiel blankaj diskoj en lia nigra vizaĝo. Subite li levis la bastonon kaj saltis batante per ĝi en la herbon. Tuj poste li levis triumfe la ĉasitan beston alten.

Ĝi estis stranga besto. Granda kiel dumonata porkido kun nigra, iom pinta nazego. La tuta dorso estis kovrita de malmola kiraso, kiu estis kunmetita el pluraj vicoj da ostaj plataĵoj. Ĝi aspektis kvazaŭ ĝi surmetis plurajn grizajn zonojn por sin ornami. Ankaŭ la kapon ŝirmis tiaj zonoj. Ĝi surhavis kvazaŭ kaskon. Inter la kapa kaj la dorsaj kirasoj elstaris nur la longaj pintaj oreloj. Poste mi ofte rimarkis, ke tiuj oreloj senĉese gardeme moviĝas ĉiufanken aŭskulte. La antaŭaj piedoj ŝajnis preskaŭ kiel manoj, kiel tiuj de talpo, sed multe pli grandaj, kun longaj ungoj por fosado.

Jozefo ridis de ĝojo, montrante siajn blankegajn dentojn. Li batis per la mano sian

ventron kaj kriis: "Bongustás, bongustás!"

Mi fritis ĝin kaj ĝi vere estis frandaĵo. Kompreneble Jozefo la ĉasisto ricevis la plej grandan pecon. La kirason ni singarde deprenis kaj ĝi funkcias kiel korbeto. Dum jaroj mi gardas en ĝi miajn kudrilarojn. Tio estis mia unua dazipo.

Poste mi multfoje vidis dazipojn. Ordinare ĝi ŝanceliĝas komike peze, sed en danĝero ĝi povas tamen kuri kiel leporo. Ĉiam ĝi malsatas kaj serĉas insektojn. Kaj kiom scivolema ĝi estas! Ĉiam ĝi venas rigardi kio okazas kaj ĉien enŝovas sian nigran nazegon. Antaŭ nelonge ni konstruis novan deponejon. Kompreneble ankaŭ estis bieneto kun barilo, kiel ĉe ĉiuj niaj konstruaĵoj. Baldaŭ poste mi trovis unu matenon en tri lokoj la murojn subfositaj per larĝaj kanaloj. Certe unu aŭ eĉ pluraj dazipoj envenis dum la nokto por esplori la internon de la nova bieno.

Malgraŭ tiaj okazintaĵoj preskaŭ ĉiuj dazipoj estas utilaj. Ili manĝas milojn da tropikaj formikoj, kiuj estas danĝeraj al ni. Malutila estas nur la "dazipo kun nuda vosto" (*Cabassus uncinatus*). Ĝi ŝtelas la maturan maizon de la kampoj. Kiam la indiĝenoj trovas ĝiajn postsignojn inter la prirabitaj maizospikoj ili metas tien pafilon kun streĉita kaŝo kaj etendas de la ĉano ŝnuron tiel ke la dazipo mortpafas sin mem. La dazipo havas la kutimon ĉiam uzi la saman vojeton, kiun ĝi antaŭe uzis. Pasintjare nia najbaro tiel kaptis tre grandan dazipon sur nia tereno kaj donacis al ni duonon.

La maljuna Johano — tiu lerta ĉasisto unuokula — rakontis al ni, ke alia speco de dazipo, la "tatu bola" (buleto-dazipo: *tolypentes tricinctus*) sin volvas kiel globo kiam la hundoj ĝin persekutas. Tiamaniere la du kirasoj kovras ĝin ĉiuflanke kaj la hundoj tute ne povas mordi ĝin. Ili rulas la bulaĵon per la piedoj kaj nazegoj ekscitite de la ĉaso kaj provante trovi lokon kie mordi kaj mortigi la beston. Sed ĝuste tian ruladon la dazipo deziras. Kiam ĝi atingas deklivon ĝi ofte ruliĝas malsupren multe pli rapide ol la hundo povas ĝin sekvi, kaj malsupre ĝi ekfosas fulmrapi

truon kaj sin savas. Ĉar nek hundo nek homo povas fosi tiel rapide kiel dazipo.

La indiĝenoj havas proverbon: virdazipo neniam havas fratinon kaj dazipino neniam fraton. Ankaŭ tio estas vera. La dazipino naskas plurajn idojn, sed ĉiam ili estas samseksaj, aŭ ĉiuj virdazipoj aŭ ĉiuj dazipinoj!

Specimenon (ŝtopitan) de tiu stranga besto vi verŝajne povos trovi en via urba muzeo; sed ĝi estas multe pli interesa kiam ĝi ŝanceliĝe iras en la plenluna lumo, ĉiam flarante kaj ĉiam movante siajn longajn orelojn.

(*) Preskaŭ ĉiujn plantojn kaj bestojn kiujn la portugaloj trovis en Brazilo kaj ĝis tiam ne konis ili nomis per la vortoj, kiujn al ili donis la indianoj. Simile ĉe lokoj. Tial la multaj tiel strangaj nomoj de brazilaj urboj, riveroj k.t.p.

("Esperanto" Nov. 1953)

BRAZILIA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Jen la nova Estraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto por 1985/1987: Prezidanto, Nelson Pereira de Souza; Vicprez., Elvira Fontes; Sekretario, Ludimar Azevedo da Silva; Kasisto, José Carlos Dorini Ramos; Kult. Direk. — Paulo Vieira da Silva.

"Brazilia Esperantisto" deziras al la nova Estraro plenan sukceson.

Nekrologo

Francisco Alves Mata

La 3-an de Januaro 1983-a forpasis en Maceió nia samideano Francisco Alves Mata, trafite de subita malsano.

Naskiĝinte en Viçosa en 1905, Mata eniris la Ŝtatan Militistan Policaron kie li atingis la rangon de kolonelo kaj estis ordenita per meritmedalo.

Kolonelo Mata estis ankaŭ multverka poeto, entuziasma radioamatoro kaj senlaca varbisto. Pere de liaj verkoj, artikoloj kaj radioelsendoj li disvastigadis Esperanton tra la regiono, en konstanta agado. Krome li fondis Esperanto-Asocion de Alagoas.

Dank' al liaj aranĝo kaj estrado grupo da junulinoj prezentis pastoralon en la kadro de 66-a Universala Kongreso de Esperanto, en Brasília.

La forpaso de Kolonelo Mata estas granda

perdo por la Esperanto-movado kaj speciale signifa por liaj karaj familianoj, kiujn ni kondolencas.

JUGOSLAVIO HODIAŬ

En la 2-a de Junio 1984, en la sidejo de B.E.L., S-ro Ivica Špoljarec, membro de la Internacia Kultura Servo, prelegis pri Jugoslavio kun projekciado de lumbildoj.

Ĉar al la prelego estis invitita la ne-esperantista publiko S-ro Jair Salles zorgis pri la samtempa tradukado de la portugalan lingvon.

S-ro Špoljarec vizitis aliajn urbojn en Brazilo kaj en Sudameriko.

En tiu ĉi numero troviĝas artikolo pri la Internacia Kultura Servo speciale verkita por "Brazilia Esperantisto".

*

BIBLIOGRAFIO

* *Esperanto: Metodo 15; Aventuroj de Sinjoro "Mimem"*. Unuiĝo Franca por Esperanto, Paris. 1983. 29 p.

Pedagogia materialo celanta paroligi komencantojn per simplaj bildoj.

☆☆☆

* *Gerda malaperis!*, Claude Piron. Fonto, Chapeco. 1983. 48 p.

Lingvoinstrua romaneto, bazita sur la principo motivi la lernanton per redukto de novaj lernendaĵoj.

☆☆☆

* *Kemia Nomenklatura*, Jan Pióro. G. und M. Westermayer, Frankfurt am Main. 1983. 37 p.

Propono pri Esperanta nomsistemo por kemio.

☆☆☆

* *Marĝene de la lernolibro*, Bernard Golden. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt. 1982. 58 p.

Kolekto de studaĵoj kun la celo instrui ĝustan lingvo-uzon.

☆☆☆

* *Mikrokomputilo: ĉu amiko aŭ malamiko?* Red. Péter Broczkó. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt. 1983. 64 p.

Artikolaro pri komputado, ĉefe pri mikroelektroniko kaj mikrokomputiloj.